

juna amiko

majo 2018 • n-ro 2/2018 (155)



PROGRESIGA REVUO
POR LEGEMULOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

Malstreĉiĝu kun *Juna Amiko*:
Pico por panjo. Somero ĉe mia
avino. Doni sangon = savi la vivon.
Kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo.

Kolibrido

Kia detruo!

Jes, iu eniris kaj ŝtelis ĉi tie.

Sed, Kolibrido, ĉi tie estas nur manĝaĵoj por birdoj. Ĉu estis iu el alia arbaro?

Hmm, mi dubas.

Tiu ne eniris tra la pordo.

Rigardu tiun truon kaj tiun spuron, la ŝtelisto devis uzi tiun truon...

Mi scias kion fari, mi kunportos amikinojn por solvi tiun enigmon.

Ĉu kokino, Kolibrido!? Ĉu vi frenezigiĝis?

Miaŭ

Penjo estas mia amikino kaj ŝi helpas nin.

Ĉu kato kaj birdo kune?

Iom poste.

Fine

Estis muso.

Ha, ha, ha. Ek do amikino mia.



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: Somero ĉe mia avino (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 9

Nia sano: Doni sangon = savi la vivon (Renée Triolle, FR) 10



Rezistemo: Ekzemplo de fortikeco (Mireille Grosjean, CH) 12



LUDE, la unika dua etaĝo: Kontraŭ ĉiu tede ekzistas rimedo (Mónika Molnár, CH) 14



Muziko: Mia lakona sinprezento (Joel Muhire, RCB) ... 16



Legu librojn – premioj – konkursoj: Ni legu...! Klubo de bona libro. Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo: Budapeŝto. Sinjoro Tadeo en Vroclava Muzeo (Małgosia Komarnicka, PL) 18



Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kanto-mondo: Dormu ho mia princet' (Małgosia Komarnicka, PL) 24



Interkultura Mondo: Amo al teo kaj al Esperanto (Elena Nadikova, RU) 26



Malstreĉiĝu kun Juna Amiko: Pico por panjo (Małgosia Komarnicka, PL) ... 32



Recenzo: Voĉlegitaj fabeloj de Andersen (Luiza Carol, IL) . 37

Fabelo: La najtingalo (Mireille Grosjean, CH) 34



Nature: Elefantoj (Jose de Jesus Campos, CU) 38



LASTE: Vetera krucenigmo (Stefan MacGill, NL/HU) 38

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Rotterdamo, Nederlando. **Reĵeto:** sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri Juna Amiko: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en septembro 2018. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318




Karaj amikoj!

Ĉu vi scias, kion faras la bela 7-jara pola knabino Julia sur la frontpaĝa foto? En Pollando la 26-an de majo oni celebras la Tagon de Patrino kaj Julia tiun tagon helpe de sia patro preparas donace ŝatatan picon por sia panjolo!

Baldaŭ finiĝos la bonodora kaj florplena printempo – kaj proksimiĝas la varma somero. La filinoj Eliza kaj Dora (en *Konversaciaj Temoj*) pasigos ĝin ĉe sia avino en vilaĝo. – Kie vi pasigos ĝin? Bonvolu skribi pri viaj planoj kaj someraj travivaĵoj al niaj legantoj, por la venontaj numeroj de *Juna Amiko*.

En tiu ĉi numero vi trovos ankaŭ aliajn pensigajn artikolojn: Ekzemple ke unu sangodonaco povas utili eĉ al tri homoj



– kaj eble eĉ savi ilian vivon; ke ankaŭ handikapuloj povas sportumi, feliĉe vivi kaj helpi ankaŭ al aliaj homoj pli bele kaj “pli fortike” vivi (en la artikolo pri rezistemo); ke kontraŭ tedo ekzistas rimedo (en la rubriko *LUDE*); ke per muziko oni povas popularigi Esperanton, ke en Esperanto ekzistas tre belaj libroj (kiel *Avinjo* kaj *Sinjoro Tadeo*) kaj ke per Esperanto vi povas ekkoni fremdajn landojn kaj ĝiajn legendojn...

Kun la nuna numero de *Juna Amiko* vi denove povos kanti, vidi interesajn filmojn, aŭskulti kaj legi fabelojn, ekscii ion pri la vivo de la plej grandaj bestoj elefantoj, solvi krucenigmon, ĝui komiksojn el Kubo kaj kolorigi bildrakonton el Ĉeĥio...

– Agrablan legadon, karaj junaj amikoj!
Via redaktoro **Stano Marček**

Karaj legantoj!

Jen vi estas lernantaj nian karan lingvon Esperanto, vi deziras progresi, pro tio vi abonas nian revuon *Juna Amiko*. Pro tio mi gratulas vin. Per legado vi ekscios novajn vortojn, vi revidos lernitajn strukturojn, vi firmigos viajn sciojn. Regula kontakto kun la lingvo endas, nepras. Regula kontakto, tio estas en ĉiu tago, eĉ mallonge sed regule, ofte. Tiel la lernitaĵoj fiksiĝas en la memoro.

Se vi devas lerni novan vorton, vi vidu ĝin ĉiun tagon dum sep tagoj. Poste vi revidu ĝin unufoje monate.

Plie legante nian revuon *Juna Amiko*, vi ekscios pri diversaj faktoj kaj personoj, agadoj kaj



landoj. Distro okupos vin amuze. La instruistoj tutcerte uzos la revuon en siaj kursoj, en paroligaj rondoj; ĝia enhavo stimulos la lernantojn. Legi estas unu el la taŭgaj strategioj; aliaj strategioj estas aŭskulti radion, ekz. la radion Muzaiko; diskuti kun konatuloj, frekventi kursojn, partopreni kongresojn. Regula kontakto kun la lernata lingvo nepras, same regula kiel manĝado, trinkado, spirado, dormado.

Konstatante viajn progresojn per nia revuo *Juna Amiko*, vi komprenos, kiom gravas, ke ĝi havu pli da abonantoj; do donacu abonon, sugestu abonon, konsilu abonon. Vivu *Juna Amiko*!

Mi deziras al vi agrablan legadon.

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI



Somero ĉe mia avino

Help-materialo por progresemuloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

I. Senesperigaj planoj por la somero

Roza, la patrino (R), kaj Henriko, la patro (P), babilas hejme kun siaj filinoj Eliza (E) kaj Dora (D).

- E - Nee! Mi ne volas somerumi ĉe Avinjo!
 R - Sed kial, mia kara? Lastjare vi ja tiel bonege fartis ĉe ŝi, en la vilaĝo!
 E - Ne! Ne, mi ne volas! Panjo, mi ne volas!
 R - Eliza, aŭskultu min! Vi estas jam granda knabino, preskaŭ plenkreska...
 E - Ja ĝuste tial Panjo! Ne sendu min al Avinjo! Mi ne volas pasigi tie la tutan someron!
 R - ... kaj via fratineto estas ankoraŭ malgranda, ŝi ne povas gardi sin...
 E - Ja ankaŭ tial, Panjo! Mi tute ne volas esti ŝia gardistino!
 R - Henriko, helpu min komprenigi tion!
 P - Eliza, filineto mia, aŭskultu unue Panjon trankvile!

- E - Sed...
 P - Eliza!
 R - Dora, ĉu vi volas veturi al Avino?
 D - Ankaŭ mi ne volas!
 R - Filinetoj, Paĉjo kaj mi ne havos libertempon en tiu ĉi somero! Ni ricevas novan taskon, kaj ni devas multe labori. Ni ne povas esti kune. Avinjo kuiras por vi bongustajn manĝaĵojn, sed vi devos, Eliza, zorgi pri Dorinjo, ĉar Avino jam ne povas postkuri ŝin. Krome, vi ambaŭ povas helpi iom al ŝi, en la kuirejo, en la ĝardeno.
 E - Sed mi ne volas...
 D - Ankaŭ mi ne volas!
 P - Eliza, lastjare vi diris, ke vi deziras havi veran biciklon. Ĝis nun, tamen, ni bezonis la monon ĉiam por io alia. Ĉi-aŭtune ni povos aĉeti por vi belan "veran" biciklon, se Panjo kaj mi povos trankvile labori dum la somero. Se ni devos zorgi pri Dora kaj fari por vi programojn, ni ne povos plenumi nian taskon.
 E - Sed...
 P - Eliza, se vi volas helpi en tio, kaj volas havi veran biciklon, vi konvinku ankaŭ vian fratineton somerumi ĉe Avinjo.

II. La mirakloj de la avinja vilaĝo

Eliza (E) kaj Dora (D) babilas kun sia avino (A), en proksima arbaro kaj en la ĝardeno de la avino.

- D - Diru Eliza, ĉu ankaŭ mi rajtas iri kun vi al la arbaro? Mi ankoraŭ neniam estis en arbaro!
 E - Jes, Dorinjo, sed surmetu ankaŭ puloveron, tie estas friska vetero matene.





- A - Knabinoj, ĉu vi pretas? Ĉu ni povas ekiri?
E - Belega arbaro ĝi estas! Kaj kiom da floroj! Avinjo, ĉu vi konas ilin?
D - Ni kuru kaj plektu florojn!
A - Pli poste, ni ankoraŭ multe promenos, kaj la floroj velkos dumvoje.
D - Kiom longe ni ankoraŭ promenos, Avinjo?
A - Rigardu mian korbon, ni kolektu ankoraŭ fungojn por la tagmanĝo. Ĉu vi ŝatas fungo-paprikajon?
E - Hm, Avinjo, ĝi estas mia preferata manĝaĵo!
A - ... Haltu! Rigardu tien!
E kaj D - Kien? Kial? Kio estas tie?
A - Tie, apud la arbusto! Kapreolo staras tie, kaj nun, ĉu vi vidas? Alproksimiĝas al ĝi alia, verŝajne ĝia parulino.
E - Ho jes! Vere! Mirinde!
D - Ni voku ilin, Avinjo, venigu ilin hejmen!
A - Ne necesas, ili mem venos vintre al ni, kaj akceptos eĉ manĝaĵon!
E - Ĉu ankaŭ mi povas manĝigi ilin?
A - Jes, certe, se vi venos vintre, kiam ili vizitos nin! Nun ni tamen turnu nin hejmen! Mi kuiros la fungojn, kaj post la tagmanĝo ni kolektos fruktojn en la ĝardeno.

...

- A - Eliza, ne plu grimpu jam sur la eskalo! Tio sufiĉas!
E - Ne timu pri mi, Avinjo! Mi ne falos suben! Mi estas lerta, mi estas la plej bona pri gimnastiko en nia klaso! Ĉi tie troviĝas la plej fruktoplenaj branĉoj.
D - Donu ankaŭ al mi acidan ĉerizon, Elinjo, mi ŝategas ilin!
E - Ho... kio tio estas? Ĉu eble iu... nesto?
A - Jes, verŝajne, ĝi estas la forlasita loĝejo de kolombo.
E - Ĉu la kolombo jam mortis?
A - Ne, sed la kolombidoj jam kreskis, kaj ili forlasis la neston. Dum la somero ili


tranoktas diversloke, kie trovas ilin la nokto.

- E - Kiel mirinde povas esti tranokti inter branĉoj kaj folioj...
A - Vi povas provi tiun senton! Mi havas hamakon; ni poste ligos ĝin al tiu ĉi kaj al la ĉerizarbo.
D - Avinjo, Eliza, ankaŭ mi, ankaŭ mi volas tie luliĝi!
A - Vi ambaŭ estas tre lertaj knabinoj! Rigardu, kiom da fruktoj ni havas! Ili morgaŭ estos jam en bokaloj, konservitaj, sur la bretoj! Kaj nun ni rigardu, kien ni pendigu la hamakon!
E - Ho, mirinde estas ĉi tie, kara Avinjo!

III. Kiu estis la plej interesa somerumado

La geamikoj de Eliza: Aŭrora (A), Boriso (B), Helena (H), Karlo (K) kaj Eliza (E) babilas en la hejmo de Helena.





- A – Kiel bonege estas denove renkontiĝi kun vi ĉiuj! Boris kaj mi jam tediĝis pri tiu ĉi somero!
- B – Jes, mojosa (modern-jun-stila) ideo tio estis, Helena!
- H – Dankon, Boriso! Kial vi tediĝis, Aŭrora?
- A – Absolute nenio okazis ekde nia alveno al la marbordo! Post la matenmanĝo ĝis vesperiĝo ni restadis sur la plaĝo; tie ni kuŝis sur ripozlitoj, silente, eĉ kanti tie ne eblis! Kiam ni eniris en la maron, tien ni ne povis ludi per pilko, kaj en la naĝejo ni ne rajtis saltadi en la basenon.
- H – Tamen nia feriado ne estis teda, sed same malbona. Miaj gepatroj volis veturi aŭtobuse por rigardi urbegojn eksterlande, kaj mi dum la tuta tempo havis vojaĝmalsanon, daŭran vomemon kaj kapturniĝon en la aŭtobuso! En la urboj mi laciĝis, la muzeojn mi malŝategis, la vendejojn eĉ pli! Kaj kiaj estis viaj ferioj, Karlo?
- K – Ili estis nek malbonaj, nek bonaj. Kiam ne pluvis, ni footballudis sur la proksima futbalejo kun la knaboj de la domo, kie mi loĝas.
- B – Rigardu tra la fenestro, ĉu ne Eliza alproksimiĝas tie?
- H – Jes, estas ja ŝi! Ŝajne sur nova biciklo! Mi malfermos la pordegon. Eliza, venu, lasu vian belan biciklon ĉi tie, antaŭ la pordo!
- E – Saluton geamikoj! Ĉu vi longe atendis min? Mi alportis por vi... (Eliza estas serĉanta en la bicikla korbo) ion... mi tuj...
- B, H, A kaj K – Saluton Eliza!
- B – Ne, ni ne longe atendis.
- A – Ni babilis pri la somerumado.
- E – (kun diversaj bokaloj kaj saketoj en la manoj) – Mi gastigos vin!
- K – Kion vi alportis?
- A – Ĉu por ni?
- H – Metu la bokalojn sur la tablon, ne faligu ilin!
- E – En tiu ĉi estas kompoto el acidaj



- ĉerizoj; en la aliaj estas konfitaĵoj el sovaĝaj framboj kaj fragoj; en la pli granda, el persikoj. Prenu!
- Ĉiuj – Ege bongustaj ili estas! Kiu kuiris ilin? Ankaŭ tion mi gustumos!
- E – Mi somerumis ĉe mia avino, kaj mi ellernis kiel konservi fruktojn! Ĝi estas suko el sambuka floro; tiun preparis la avino, gustumu ankaŭ ĝin!
- A – Kiel lerta vi estas!
- B – Kaj vi eĉ pensis pri viaj geamikoj!
- E – Kaj jen, rigardu: ĝi estas sekigita fungo, kaj ili estas malgrandaj buketoj de spicherboj...
- H – Vi tiom multe laboris, Eliza! Dankegon pro la donacoj!
- E – Tio ne estis laboro por mi! Tio estis aventuro, interesaj promenoj en la arbaro kaj sur la kampoj kaj gaja ludo sur la arboj por kolekti fruktojn... Mi vidis birdojn kaj nestojn kaj en la arbaro eĉ kapreolojn! Kaj vespere, kiam estis bona vetero, mi ripozis en hamako, supre, inter branĉoj, kie jam nur birdoj estas, kaj mi rigardis la stelojn, aŭskultante najtingalojn, ĉirkaŭe briletis noktaj papilioj... Povas esti, ankaŭ iuj feinoj... Tiuj tagoj estis mirindaj, neforges-eblaj...



TASKOJ

I.

- Atente, almenaŭ dufoje legu la unuopajn ĉapitrojn, komencu per la 1-a, kaj nur poste, jam plenuminte la taskojn, iru al la sekvaj ĉapitroj!
- Respondu la demandojn: Kiu ne volis veturi al la Avino? Kiu petis Elizan somerumi ĉe la Avino? Pri kiu devus atenti Eliza dum la somero? Kiun donacon deziras ricevi Eliza? Kion promesis la patro al Eliza, se ŝi obeos kaj somerumos kun sia fratino ĉe la Avino? Kial petis tion la gepatroj de Eliza?

II.

- Post atenta legado de la 2-a kaj 3-a ĉapitroj, kolektu, kiujn a) plantojn (florojn, arbojn ktp); b) bestojn (birdojn, insektojn ktp) renkontis la infanoj dum la somero!
- Vicigu, kun kiuj manĝaĵoj konatiĝis Eliza dum la someraj ferioj!
- Vicigu, kiujn arbojn, plantojn, florojn vi povas trovi dum promenado en via regiono!
- Vicigu, kiujn bestojn kaj bestetojn eblas vidi dum nemalproksima ekskurso ĉirkaŭ via loĝloko!
- Vicigu, kiuj estas la karakterizaj manĝaĵoj de via regiono!
- Vicigu, kiujn "aventurojn" renkontis Elizan (ekzemple: ŝi promenis tra arbaro, serĉante fungojn)!
- Vicigu, kiujn donacojn alportis Eliza al siaj geamikoj (nepre uzu la mezurojn kun "da"!)
- Rakontu, kie somerumis la geamikoj de Eliza, kaj kial tio ne plaĉis al ili!

III.


- Rakontu (aŭ skribu) en 2 ĝis 4 frazoj, kial, laŭ vi, Eliza komence

ne volis somerumi ĉe sia avino!

- Ĉu vi mem vivas, aŭ jam feriiis en vilaĝo aŭ kampara regiono? Priskribu viajn impresojn en 5 – 10 linioj!
- Skribu (ret)leteron, en 10 – 15 linioj al via esperantista amik(in)o, en kiu vi rakontos, en la nomo de Eliza, kiel ŝi feriiis!
- Kolektu argumentojn kaj preparu mallongan (ĉirkaŭ 15- – 20-linian) prelegeton, kial indas ferii fore de urboj, en vilaĝa aŭ kampara regiono!

VORTKLARIGOJ

Friska: malvarmeta. *Velkas*: floro, planto perdanta sian forton, fariĝas seka. *Fungo-paprikaĵo*: fungo stufita kun cepo kaj papriko. *Eskalo*: ŝtupetaro. *Bokalo*: vazo el vitro por konservi konfitaĵon. *Konfitaĵo*: konservita frukto per kuirado kaj densigo, ofte kun sukero. *Plaĝo*: vasta bordo de maro, lago aŭ rivero, aranĝita por akcepto de feriantoj. *Vojaĝmalsano*: malbonfarto, vomemo, vomado, kapturigo, kaŭzita de veturado. *Sambuko*: arbusto kun bonodoraj, blankecaj floroj, el kiu eblas prepari sukron. *Kompoto*: kuirita frukto kun akvo aŭ vino. *Najtingalo*: birdo, karakterizata de bela, trila kanto, ankaŭ vespere kaj nokte. *Feino*: belaspekta, fantazia, fabela estaĵo, ofte kun virina aŭ infana korpo.




El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supraj Nomu la objektojn, beston kaj homojn! Kion ili faras? Kiujn vestojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, fruktoj, besto kaj vestoj? Kio okazas sur la bildoj?



Kolorigu! Trovu la 13 diferencojn!



Renée Triolle

Doni sangon = savi la vivon


Ĉiu infano, kiu falis, malkovris ruĝan fluaĵon ĉe la genuoj: tio estas sango. Ĝi konsistigas 8 procentojn de la homa korpo.

Kio estas sango?

Ĝi estas fluaĵo, kiu cirkulas per “tuboj” (arterioj kaj vejnoj) tra la tuta korpo, en fermita cirkvito. Ĉiu homo havas 5 litrojn da sango, kiu konsistas 90-procente el akvo.

Ĝi estas ruĝa pro la ruĝa kemiaĵo (hemoglobino), kiu troviĝas en la ruĝaj globuloj (eritrocitoj; 41% de la tuto). En pratempo oni diris, ke nobeloj havas “bluan” sangon, ĉar ili ne laboris en kampoj, ne bruniĝis kaj tra la blanka haŭto videblis bluaj vejnoj. Sed en ĉies korpoj tra la mondo sango estas ruĝa.

La blankaj globuloj (leŭkocitoj) estas defendantoj: estas 4 ĝis 11 miliardoj da ili en unu litro da sango, ili detektas “agresanton”, t.e. fremdan bakterion, ĉirkaŭas kaj forglutas ĝin. Kune kun



trombocitoj (globuletoj) ili konsistigas nur 4 procentojn de la sango, sed ili tre gravas kontraŭ infekcio. Plasmo (la likva parto) konsistigas la restantajn 55%.

Kiun rolon ludas la sango?

Ĝi estas la peranto, kiu cirkulas inter ĉiuj organoj de la homa korpo. Ĝi havas

- **nutran rolon:** vi manĝas kaj trinkas, digestas ĉion, kaj tra la maldika intesto la sango portas nutraĵon al la organoj (muskoloj ktp);
- **spiran rolon:** vi spiras puran aeron (oksigenon), kiun la sango portas al diversaj organoj kaj la malpuran revenigas al la pulmoj, kiuj filtras kaj elirigas CO₂ (karbondioksidon);
- **purigan rolon:** post digesto restas malpuraĵoj, kiujn la sango transportas al la renoj, kiuj ilin elfiltras;
- **defendan rolon:** se la korpo estas atakita de “fremdaĵo” okaze de vundo aŭ bruligo, la blankaj globuloj reagas;
- **perantan rolon:** la sango permesas al la organoj komuniki inter si kaj interŝanĝi. Arterioj estas la tuboj, kiuj kondukas puran sangon el la koro, vejnoj kondukas la malpuran al la koro.

Doni sangon = savi la vivon





Unu sangodonaco povas utili al 3 homoj. Sed unue necesas kontroli, ĉu la sango estas “pura”, t.e. ne transportas malsanon. Granda ŝoko estis en Francio inter 1985 kaj 1990; kiam oni konstatis, ke pere de sango oni transdonis al 4400 malsanuloj la viruson de AIDS*. De tiam oni kontrolas kiel eble plej bone la donitan santon per demandaro al la donanto (ĉu li estas drogulo, drinkulo, malsanulo, uzanta kuracilojn ktp) kaj per filtrado de la sango, por elimini la blankajn globulojn (la defendantojn).

Esploritaj estas la sangaj grupoj: nur 4 por la tuta homaro; iuj grupoj estas pli oftaj ĉe kelkaj landoj.

- O (45 % de la homaro)
- A (40 %)
- B (11%)
- AB (4 %)

Por eviti, ke la korpo de la ricevinto reagu kontraŭ agreso de fremda sango, necesas kiel eble plej bone akordigi la sangogrupon kaj resusfaktoron** de la doninto kaj la ricevonto.

Monda diskriminacio

122 landoj el 179 havas nacian politikon pri sangotransfuzo, sed 79% estas “riĉaj” landoj (19% de la monda loĝantaro); nur 4,6% reprezentas malriĉajn landojn.

Ankaŭ inter ricevantoj estas diferenco: en riĉaj landoj 76% de la ricevantoj estas

maljunuloj pli ol 65-jaraj, dum en malriĉaj landoj 65% estas infanoj sub 5 jaroj...

Feliĉe en la plimulto de la landoj (74), sangodonaco estas senpaga. Donacinto ne ricevas monon por sia donaco, sed ricevas trinkaĵon kaj manĝaĵon por kompensi la perdon, eĉ se sango rapide renoviĝas. En 71 landoj 50% el la donacoj venas el la familianoj de la malsanulo aŭ el pagitaj homoj (en lando kiel Usono, doni sian sangon iĝis maniero perlabori monon...).

Ofte estas limigita la nombro da donacoj (maksimume 6-foje jare, nur 4 por virinoj, kiuj ĉiumonate sangas dum menstruoj), same limigita estas la kvanto de la donata sango (en Francio 400 ml, eĉ se ĝi renoviĝas, oni ne malfortigu la donanton, elprenante tro da sango) kaj la aĝon de la donanto, kiu devas esti inter 18- kaj 70-jara kaj pezi pli ol 50 kg.

Eĉ se kelkaj religioj miskonsideras sangodonacon, kuracistoj ĉie batalas por konvinki, ke sango-donado kaj -ricevado estas sendanĝera. Tiu alporto de nova energio kun nova sango iĝis ĉe sportistoj rimedo de stimulado, malfacile detektebla, ĉar la sportisto aldonas plian sian sangon al sia sango.

Doni sangon estas facila, neriska, senkosta rimedo por helpi aliulon. Pensu, ke dek kvin minutoj el via vivo povas savi infanon aŭ patrinon, aŭ junulon post akcidento. Imagu, ke eble ankaŭ vi iam en via vivo bezonos transfuzon kaj dankos la anonimulojn, kiuj faris tiun bonvoleman geston.

*AIDS (aidoso): Akirita Imun-Deficita Sindromo; ĝi transdoniĝas tra sango kaj spermato. Evitebla per ununura uzo de pikilo ĉe drogulo.

** Resusfaktoro: sango de la grupoj Rh+ aŭ Rh-.






Mireille Grosjean

Ekzemplo de rezistemo (adaptokapablo)

La vorto “rezilienco” (rezistemo, adaptokapablo) ekzistas en la franca kaj en la angla (eble en aliaj lingvoj ankaŭ) kaj tiu vorto eble baldaŭ eniros en nian vorttrezoron. Ĝi signifas, ke iu persono havas apartajn kapablojn por denove stariĝi kaj feliĉe vivi post malfacila vivmomento, funebro, atako, perforto aŭ alia tre doloriga travivaĵo.

Sylke Pan (1973) emis moviĝi. Ŝi brilis en plonĝado (el saltobreto enakven), en arta gimnastiko, en uzo de trampolino/saltotabulo, en dancado. Ŝi frekventis diversajn cirkolernejojn kaj



finfine iris al Berlino por progresi en tiu arto. Tie ŝi diplomiĝis. Kun grandaj sukcesoj en la magia lumo de cirko ŝi saltis de trapezo al alia trapezo kune kun sia edzo. Dudek jaroj da sukcesa kariero, parte en cirko Nock.

En 2007 ŝia vivo brutale ŝanĝiĝas: okazis akcidento: ŝi falis. Ŝi frakasis sian dorson (la dekan kaj dekunan vertebrojn dorsajn) kaj perdis la uzon de siaj kruroj. Ŝi nun devas uzi rulseĝon. Tamen ŝi plu volis moviĝi, kiel en sia junaĝo. Ŝi ekuzis “handbike”, kuŝantan biciklon, kie oni movas la vehiklon per la manoj.

Hazarde mi aŭdis ŝin ĉe la svisa radio kaj mi devis enorme admiri ŝin. Tiom da kuraĝo ŝi havas! Mi decidis intervjui ŝin por vi, karaj legantoj de *Juna Amiko* kaj karaj aŭskultantoj de Muzaiko (tuttempa internacia interreta radiostacio en Esperanto). La diskuto okazis en la franca, ĉar ŝi kaj mi loĝas en franclingva




Svislando. Do mi tradukis por vi kelkajn ŝiajn frazojn.

“Ni ĉiuj povas elekti nian manieron alfronti nian destinton. Estas nia respondeco kaj morala devo pozitive uzi nian vivon. Homo havas liberan elekton: ni povas decidi, ĉu niaj problemoj fariĝos marĉoj, kiuj manĝos nin, aŭ nova elano por salti pli alten. Kiam mi ekzercis plongadon, mi konstatis, ke mi devis eniri akven kaj atingi la grundon por tie puŝi min alten denove. En ies vivo okazas la samo: se venas frapo, oni uzu ĝin por atingi la surfacon denove kaj eĉ iri pli alten. La malfacila momento en la vivo donas al ni forton. Ni ne simple naĝu kun la fluo, ni agu laŭ nia volo, ni iru nian vojon celitan.”

Sylke plu parolas: “Ĉiu persono havas talenton kaj povas, devas kontribui al bonfarto de la mondo. Tiuj personoj, kiuj daŭre plendas, alportas nenion al la mondo.”

Nun ŝi estas ĉampionino en manbikiklado... ŝi grimpis bicikle sur la 15 plej altajn alpajn pasejojn... Ŝi ofte biciklumis por kolekti monon por kuracaj programoj kiel SPART*. Ŝi vivas kun konstantaj



doloroj. Tamen ŝi diras: “Se mi koncentriĝas sur miajn dolorojn, tio utilas al nenio. Mi devas lerni distanciĝi de mia dolora korpo. Se iu plendas, tio similas al kraĉado sur donacon. La vivo estas donaco, tiom bela donaco. Se mi pensas pri miaj brakoj, kiuj bone funkcias, tio ebligas al mi resti pozitiva.”


Ŝi gvidas kaj konsilas diversajn sportoskipojn kaj grupojn el kunlaborantoj de entreprenoj (coaching) kaj prelegas multe. Ŝi verkis libron, kiu aperis en aprilo 2018. “A la conquête de nouveaux sommets” (konkerante novajn pintojn). Ŝi daŭre sportumas, ĉar ŝi ŝatas tion, kaj ĉar tiu aktiveco estas saniga por la sanaj personoj kaj ankoraŭ pli por la handikapitoj, por ilia sangocirkulado, bona staro aŭ sido, fortikigo de certaj muskoloj ktp.

Ni trovu kuraĝon el ŝia ekzemplo!

**Asocio, kiu celas subteni diversajn sportajn, kulturajn aŭ esplorajn projektojn, kiuj povas kontribui al pli bona vivo por handikapitoj pro paraplegio - paralizo de kruroj.*



Kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

Nova tago komenciĝis por la Ulidoj, kaj kiel ĉiu nova tago, ankaŭ tiu ĉi alportis siajn ĝojojn kaj malĝojojn.



Revemulido ĝojegis pro la sunplena tago. Li jam de longe revis pri senzorga sunumado, sed la vetero ĝis nun ne estis favora por tio. Finfine, tiu ĉi ŝajnis esti lia tago. Li preparis la ripoz-seĝon, la sunokulvitrojn, la sunkremon kaj malvarman citronosukon. Mankis nur iu bona libro por ke la plezuro estu perfekta. Li ekiris al la familia biblioteko por serĉi interesan libron. Li ankoraŭ eĉ ne atingis la ĉambron, kiam li jam suspektis, ke la tago ne por ĉiuj estas tre ĝojplena. Iu plorĝemis en la biblioteko...

- Ho, Legemulido, kial vi ploras en via preferata ĉambro? Kio okazis? Ĉu vi ne





vidis kiom belan tagon ni havos hodiaŭ? Prenu libron kaj venu kun mi en la ĝardenon por legi, sunumi, ripozi. Ĉu tio ne plaĉus al vi?

- Jes, certe tio plaĉus al mi, sed mi ne plu havas bildrakonton, kiun mi ankoraŭ ne legis kaj tio estas terura! - diris Legemulido kaj rekomencis la ploradon.

- Mi komprenas, ke tio estas teda afero, sed tamen ne katastrofo. Estas tiom da aliaj libroj ĉi tie. Vi certe ne legis ĉiujn, do...

- Kompreneble mi ne legis ĉiujn, sed miaj preferataj estas la bildrakontoj kaj ilin mi jam legis ĉiujn. Vi havas ŝancon, vi certe trovos bonan libron por vi, sed mi...

- Ankaŭ vi! Vi certe ne konas la novan papilian historion de Zéphir Beuret ['zefir beure']! Prenu ĝin kaj venu eksteren por legi. Mi dividas kun vi mian citronosukon.

<p>la historio de la papilio</p> 			
<p>Zéphir Beuret: La historio de la papilio</p>	<p>Estis foje papilio, kiu estis tute griza. La tute griza papilio estis tre trista. Ĝi ploris la tutan tagon pro la tristeco.</p>	<p>Lun tagon la papilio ekhavis ideon. - Mi volas pentri mian tutan korpon je ruĝa kaj blua koloroj. - diris ĝi.</p>	<p>La problemo estis, ke la papilio devis trovi tiujn kolorojn. - Sed kie mi povas trovi ruĝan kaj bluan kolorojn?</p>



<p>La papilio serĉis la kolorojn ĉie en la domo. Ne estis facile trovi ilin, sed iun tagon ĝi tamen sukcesis trovi ilin.</p>	<p>La sekva problemo de la papilio estis trovi kiel kolorigi la tutan korpon. Ĉu per penikoj? Ĉu per verŝo de la koloroj?</p>	<p>La papilio denove ekhavis bonan ideon. Ĝi simple iris kaj plonĝis en la du kolorojn unu post la alia.</p>	<p>Finfine la papilio fariĝis tre-tre kontenta. Ĝi fiere montris al la tuta mondo sian tute bele kolorigitan korpon.</p>

- Estis tre bela historio! Dankon pro la propono. - diris Legemulido. - Mi eĉ ne komprenas kial mi ne vidis ĝin antaŭe. Mi bone komprenas la papilion, kiu estis tre trista sen koloroj. Ankaŭ mi estas ĉiam trista sen novaj bildrakontoj. Havi nenion estas trista afero. Kredu min!

- Eble, sed ankaŭ havi ĉion povas esti trista afero! Se vi ne kredas tion, jen alia bildrakonto por vi el la plumo de Nathan Chidlow ['natan ŝidlo'].

La leopardo havis ĉion, tamen estis trista... Sed mi ne rakontas pli, legu ĝin vi mem.

<p>La leopardo la plej rapida</p>		
<p>Nathan Chidlow: La plej rapida leopardo</p>	<p>Fine de la 100-metra konkurso, ni aŭdas la rezultojn: „Jes! Kaj Maks, la leopardo gajnis denove!” Sed Maks ne estas ĝoja: - Mi gajnis. Estis tro facile.</p>	<p>Kial Maks ne kontentas? Eble ĉar... ĉar sur la kameno de Maks ne plu estas loko por pliaj trofeoj... Nek sur la tablo, nek sur la lito, eĉ ne sur la lampo... Aj-aj!</p>





La kvanto da trofeoj kaŭzis problemon al Maks, sed li ne kapablis ĉesi konkursi. Li tro multe ŝatis tion, do li trovis novan ideon:
- Mi partoprenos la 2000-metran kur-konkurson!
Tie estos malfacile gajni multajn trofeojn.



Malfacile aŭ ne, je la fino li denove gajnis!
- Neeeee! Mi denove gajnis! Mi estas tre trista.
En mian domon eĉ unu sola plia trofeo ne povas eniri. Kion mi faru nun? Mi tamen devas iri hejmen kun mia nova trofeo...



Maks bone antaŭsentis la grandan problemon. Kiam li eniris la domon kun la nova trofeo, li aŭdis „krak-krak-BUM!”, kaj la domo eksplodis! Nur kelkaj liberiĝintaj trofeoj kaj pokaloj ĝojis, ĉar en la domo ili apenaŭ havis lokon antaŭ la eksplodo...



- Ho, ne! Mia domo! Miaj trofeoj! Mia tegmento! Mi havis tro da aferoj kaj nun mi havas plu nenion! Mi estas „fuŝita”!!! - ploris Maks ĉe la ruinoj de sia domo. Neniu povis konsoli lin. Kion li faru nun?



Post la trista evento Maks prenis gravan decidon:
- Mi neniam plu volas kuri en mia tuta vivo! Neniam!
Kaj li ekmarŝis tiom malrapide, ke la heliko apud li ĝoje kredis sin rapida besto!

- Almenaŭ iu kontentis... - diris heziteme Legemulido.
- Jes, kiel vi diras, almenaŭ iu kontentis. Tamen, Maks povintus esti pli racia antaŭ ol li perdis sian domon, ĉu ne? Kaj rilate viajn bildrakontojn...
- Jes, jes, vi pravas. Mi legas ilin tre rapide kaj oni ne povas ĉiam aĉeti novajn, ĉar nia domo baldaŭ havos la saman sorton, kiel tiu de Maks. Ĉu ne? Mi eĉ trovis la bonan solvon por esti kontenta havi iom da bonaj libroj, sed tamen ne tro!

La solvo estas la...
- La biblioteko kaj la libro-pruntado! - finis la frazon kune la du amikoj kaj pasigis la reston de la tago ĝoje kaj kontente en la ĝardeno.



Joel Muhire:

Mia lakona sinprezento

Mi nomiĝas Joel Muhire, 28-jara instruisto pri Esperanto kaj muzikisto el Rutshuru, oriente en Kongo (Dem. Resp.).

Mi konatiĝis kun Esperanto en 2008 danke al s-ro Honoré Sebuhero. Tiam Esperanto estis nekonata lingvo por preskaŭ la tuta loĝantaro de Rutshuru.

Mi ekĝojis, eksciinte pri la ekzisto de tiu lingvo tre eksterordinara, apartenanta al neniuj popolo aŭ lando kaj kiu celas igi la tutan mondon unusola familio, kies anaro interkomunikas fratece inter si. Tio donis al mi pli da energio plulerni Esperanton ĝisfunde. Retrorigarde al mia infana tempo, kantado kaj komponado de kantoj okupadis mian menson, kaj donadis al mi kreivan senton pri muzika artumado. Kaj nun mi ekkomponis kantojn, kiuj povas vekti en multaj ŝaton esperantistiĝi. Koncerne nian lingvon Esperanto, muziko estas konvinka fakto pri la vivanteco de Esperanto kaj helpas ĝian fulmrapidan diskonigon al granda publiko tra la mondo. Mi tial enŝoviĝis en la mondon de muzikistoj en 2012, nesciante, ĉu iam mi sukcesos lanĉi muzikajn verkojn.

Tamen, pro malbonaj sekurecaj kondiĉoj en Rutshuru, mi fuĝis al Ugando, kie mi komponis la kanton “Al nia lingvo” (poemo de Julio Baghy), ĉar mi estis kunportinta tien la tekston... Ĉiujn ceterajn kantojn mi komponis post la reveno hejmen en 2014. Tiujare mi okazigis propagandcelan Esperantan dissendon tra la Radio Alliance



FM kaj en la orfa lernejo Njiwa. Ne estis facila tasko komprenigi homojn, ke nia lingvo estas parolata ĉie tra la mondo. Mi do planis proprarime efektiviĝi mian delongan revon, nome eldonon de dekpeca muzika albumo “Esperanto, ilo de paco” en marto 2017, por pruvi al lokaj diskutemuloj, ke Esperanto vivas kaj ĉiukampe uzeblas! Mi tre ĝojas, ke la enhavon kaj la kantoritmon aprezas nuntempe multaj esperantistoj, kaj ke la melodion ŝatas neesperantistaj aŭskultantoj de la lokaj radiostacioj. Ili jam konvinkiĝis pri la relativa facileco de nia lingvo. Ĉiuj miaj kunkantistoj, korusanoj de “Senopone antaŭen” estas lernantoj el mia klubo Rondo Esperantista de Kiwanja, krom mia eksa kolego Frato Elie Havugimana. Mi strebis aranĝi ĉion en studio kaj sukcesis sendi kelkajn albumojn al la libroservo de UEA; bedaŭrinde miaj poŝoj truiĝis kaj mi estas tute senpova multobligi aliajn DVD-albumojn por neesperantistoj, kiuj petas ilin. Mi revas eldoni sekvajn albumojn. Se vi ŝatas muzikon, via subteno bonvenas al nia konto ĉe UEA: jmhr-a. Vi povas provaŭskulti miajn kantojn MP3-formate ĉi tie: www.senopone.wordpress.com/albumo kaj jutube spekti videokanton: <https://youtu.be/FslCpvqdFhI>. Poŝte: PO Box 08 Ug, Bunagana- Kisoro, Ugando. Rete: joelmuhire0@gmail.com

Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



Ni legu... !

Specialistoj, kiuj okupiĝas pri evoluo de infano, substrekas influon de legado al aktivigo de kvin gravaj kompetentecaj kampoj: emocio, ripozo, komunikado, koncentriĝo kaj emocia inteligenteco.

Emocio – Per legado oni lernas empatian kaj sentemon. Konvenaj libroj estas formo de terapio (kuracado) precipe por timemaj, aŭ tro agresemaj infanoj.

Ripozo – Legado estas unu el la plej bonaj rimedoj de ripozo, ĉar ĝi donas kvieton kaj silenton al nuntempaj infanoj, precipe post tro longa rigardado de televido kaj ludado per komputilo.

Komunikado – Legante infano lernas esprimi siajn pensojn kaj kompreni parolmanieron de aliaj homoj. Legado do formas kapablecon de memstara pensado kaj formuladon de pensoj. Tiuj kompetentecoj estas bezonataj por ĝusta socia funkciado.

Koncentriĝo – Tro multe da impulsoj nune ĉirkaŭas infanojn kaj ili estas nervozaj kaj maltrankvilaj. Tio kaŭzas, ke ili sentas sin malcertaj kaj malfacile toleras fiaskojn. Unu el la aktivaĵoj, kiuj

helpas al infanoj plilongigi la tempon de koncentriĝo, estas lernado de legado.

Emocia inteligenteco – Memstara legado estas por infanoj peno, kiu ellaboras en ili paciencon kaj taŭgecon atendi premion kaj do ekzercas ankaŭ atenton kaj kontempladon.

Malgraŭ tio, ke legado ne estas kuracilo por ĉiuj malfacilaĵoj de niaj infanoj dum la lernado, ĝi estas unu el la plej bonaj rimedoj por eviti ilin. Infanoj, legu, legu kaj legu, ĉar tio estas ankaŭ bona ludo.



Legu, legu, legu!

Klubo de bona libro


La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.



Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas la libron “Avinjo” (germane “Oma”) de Peter Härtling, kiun el la germana tradukis Nora Caragea. La unua eldono estas kun bildoj de Peter Knorr kaj ĝi estas aĉetebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo.

Legante la libron vi ekkonos kvin-jaran knabon, kiu nomiĝas Kalle. Kiam mortas liaj gepatroj, lia avino decidas zorgi pri li. Kalle unue tute ne perceptas, kio okazis. Poste li konstatas, ke ĉio estas tute alia ol antaŭe, kiam li estis kun la patro kaj la patrino.



Li amas la avinjon, ĉar ŝi estas bonega, sed maljuna. La avinjo klopodas bone eduki la nepon, sed ŝi konscias, ke ŝi jam estas maljuna. Ŝi rakontas al Kalle multe pri aliaj tempoj. La nepo kaj la avinjo iom post iom al kutimiĝas unu al la alia kaj entreprenas komunan vojaĝon.

Pasas kvin jaroj kaj Kalle jam estas dekjara knabo. Tiam malsaniĝas la avinjo kaj okazas, ke nun ŝi bezonas helpon de sia nepo...

Ĉi tiu libro ricevis premion “La plej bona infanlibro” kaj Peter Härtling estas unu el la plej popularaj germanaj aŭtoroj de libroj por infanoj kaj gejunuloj.

Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj



Aprile mi vizitis Budapeŝton kun studentinoj de Esperanto-kurso, kiun mi gvidas en Vroclavo.

La 8-personan grupon en la ĉefurbo de Hungario atendis Éva Balogné Fodor kaj Anna Besenyei. Dum nia mallonga, 3-taga restado ni havis eblon admirati la urbon, ĝiajn historiajn antikvaĵojn, ekkoni kelkajn esperantistojn, danci kun partoprenantoj de la danc-kurso de Eva kaj ankaŭ provi bongustajn hungarajn manĝaĵojn...

Mi do proponas, prenu mapon, trovu la eŭropan landon Hungario kaj per kelkaj informoj, trovitaj en interreto,

konatiĝu kun ĝi. Poste tra legu la rubrikon kaj klopodu trovi sur la mapo la menciitajn lokojn – kaj fine faru la konkursajn taskojn.





Kio allogas min en Budapeŝto?

Budapeŝto (hungare Budapest – prononcu Budapeŝt) estas la ĉefurbo de Hungario. Ĝi estas unuiĝo de tri urboj: Pest, Buda kaj Óbuda, kiu okazis oficiale kaj laŭjure la 1-an de januaro 1873. La urbon distranĉas la rivero Danubo.

Vizitante la urbon per ŝipo, precipe vespere, oni havos la okazon admiri bele lumigitajn konstruaĵojn, ambaŭflanke de la rivero Danubo. Tiu ŝipvojaĝo donas neforgeseblajn impresojn kaj ĉiu estos ravita per belaj vidaĵoj kaj cetere la ŝipvojaĝo permesas pli bone vidi pontojn, kiuj interligas Budan kaj Peŝton. Ĉiuj tiaj pontoj estis detruitaj dum la dua mondmilito, sed ili estis rapide rekonstruitaj.

Buda estas monteca urboparto. Ĝia fortikaĵmonto kun la apuda Danubo-bordo estas unika centra parto de Budapeŝto kaj estas taksata de Unesko kiel nepre savinda kaj evoluiginda ero de la Monda Kultura Heredaĵo, kiun oni devas protekti. La koro de tiu kvartalo estas iama Fortikaĵo kun fabeleca Fiŝista Bastiono, gotika Matias-preĝejo. Apude estas majesta reĝa palaco, en kiu troviĝas Hungara Nacia Galerio. Sur la Gellért-monto (hungare: Gellért-hegy) estas la plej bela panoramo de Budapeŝto.

Vizitante Peŝton vi tuj rimarkos diferencon inter la preskaŭ la kvietaj Buda kaj la brua Peŝto. Vi ankaŭ rimarkos logikan vojsistemon nur en Peŝto, ĉar Buda estas monta parto.



La parlamentejo



Placo de Herooj

Promenante en la impona “avenue Andrásy” (2310 metrojn longa – ĝi estas monda heredaĵo) ni aliros al la Placo de Herooj, la plej grandioza placo de Budapeŝto. Ĝian imponan aspekton kreas tri artaj konstruaĵoj: Memorpalaco, Belarta Muzeo kaj Arta Halo. Unu el la plej belaj placoj de la ĉefurbo de Hungario estas la Placo Kossuth Lajos. Ĝi konsistas el tri gravaj konstruaĵoj: La Parlamentejo (la plej konata ŝtata konstruaĵo), la Popola Muzeo kaj la Ministerio pri Agrikulturo.

Krom la fortikaĵo kaj Parlamentejo la plej grava artvalora konstruaĵo estas la Baziliko de Sankta Stefano. En ĝi troviĝas la relikvo, la dekstra mano de la unua hungara reĝo Stefano la 1-a.

Budapeŝto estas ankaŭ nomata “la urbo de kuracbanejoj”. Ĉi tie troviĝas pli ol 130 funkciaj varmaj fontoj.



La Matias-preĝejo

La urbo havas perfekte solvitajn trafikojn. Vi povas viziti ĝin per troleaj tramoj, aŭtobusoj, trajnoj, ŝipoj, metroo kaj eĉ aviadiloj.

De niaj hungaraj ĉiĉeroninoj ni eksciis, ke hungaroj manĝas multe kaj grase. Nepre oni devas provi nacian pladon, gulaŝon en kaldroneto, kiu konsistas el viando kaj legomoj. Bongustaj estas ankaŭ Halászlé (tradicia fiŝa supo – ĝiaj ĉefaj elementoj estas fiŝo, kapsiko kaj cepo). Por deserto valoras gustumi la tradicion hungaran kukon kürtőskalács (speciale preparita kun kakao, cinamo, nuksoj kaj sukero) aŭ la de infanoj ŝatatan pöttyös (fromaĝa briketo kun ĉokolado). En Budapeŝto vi trinkos ankaŭ unu el la plej bongustaj kafoj en Eŭropo.

Ĉu vi scias, ke La Kubo de Rubik (aŭ Rubik-kubo / hungare: Bűvös kocka kaj do magia kubo) estis eltrovita de la budapeŝta profesoro de arkitekturo Rubik Ernő?

Legendoj

Karaj legantoj, mi proponas tralegi du legendojn. Dank' al ili vi ekscios:

- ❶ kiel ekestis la plej granda lago en Hungario kaj en Mez-Eŭropo, la Lago Balatono nomata "la maro de la hungaroj" (hungare *a magyarok tengere*), kiu situas ĉ. 80 km de Budapeŝto,
- ❷ kial Margareta, el la Árpád-dinastio, fariĝis sanktulino.

La lago Balatono

Antaŭlonge la teritorio de la nuna Hungario estis marĉo. Vivis en ĝi grandegaj bestaĉoj, kiuj konstante kverelis unu kontraŭ la alia.

Unu tagon la kverelo ŝanĝiĝis al batalo. Ĝi daŭris tutan tagon. Travivis nur unu bestaĉo, kiu nomiĝis Balatono. Vidante, kio okazis, ĝi komencis plori kaj enterigis ĉiujn siajn kolegojn en unu tombo. Tiel ekestis la monto Badacsony.

Kiam Balatono estis sola, ĝi ekkonis grandan taŭron kaj ĝi fariĝis ĝia amiko. Bedaŭrinde unu tagon la amiko enmarĉiĝis kaj ne scipovis liberiĝi. Balatono provis helpi, sed tiam el sub la marĉo ekflugis akvofluo kun granda forto, ke Balatono kaj la taŭro ne saviĝis, ĉar la akvo malliberigis ilin por ĉiam.

Tiel ekestis la lago, kiu nomiĝas Balatono. Mallibera bestaĉo provas liberiĝi sin ĉiufoje dum fulmotondro ĉe la lago.

Sankta Margareta

Dum la tatara invado la hungara reĝo Adalberto la 4-a kun sia edzino, la bizanca princino Maria Laskaris, promesis dediĉi al Dio sian ankoraŭ nenaskitan bebon, se la hungaroj venkos. La 27-an de januaro 1242 naskiĝis filino, kiu ricevis la antaŭnomon Margareta. Kiam ŝi estis 3-jara, la reĝaj gepatroj konkorde kun la promeso donis ŝin al la monaĥinoj de la dominikana ordeno en la urbo Veszprém. La reĝo, por



Baziliko de Sankta Stefano

sia filino, ordonis konstrui monaĥinejon sur la Insulo de Leporoj, la nuntempa Insulo Margareta, en Budapeŝto.

Post iom da tempo ŝia reĝo-patro dufoje vizitis ŝin en la monaĥinejo, petante ŝin je dinastia edziniĝo, argumentante, ke Romo absolvos ŝin pri ŝia voto. Li proponis unue la polan reĝon kaj poste la ĉehan reĝon, sed Margareta ne volis eĉ aŭdi pri edziniĝo kaj rifuzis la peton de la patro.

Margareta, fariĝinta modesta monaĥino, elvokis estimon pro sia humila kaj memsuferiga vivstilo. Ŝiaj bazaj reguloj estis: “Ami Dion, rifuzi sin mem (abnegacii), malami nenium, forjuĝi nenium”. Pro sia asketeca vivo ŝi mortis la

18-an de januaro 1271, havante dudek ok jarojn, antaŭdirante la horon de sia morto. Nur en la jaro 1943 ŝi estis sanktigita.

La konkursa tasko estas jena: Trovu aliajn informojn pri Budapeŝto kaj aliajn legendojn kaj sendu ilin al ni. Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) prezentas la tekston de la legendoj.

La konkurstan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30-a de julio 2018 al la adreso de la rubrikestrino.

La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole Europejskie Centrum Edukacji Miedzykulturowej).



Ene de Baziliko de Sankta Stefano



Monumento de Sankta Gerardo



Sinjoro Tadeo en Vroclava Muzeo

Merkrede la 10-an de januaro 2018 je la 17:00 en la fama Muzeo de Sinjoro Tadeo en Vroclavo okazis renkontiĝo kun la epopeo de Adam Mickiewicz “Sinjoro Tadeo en la lingvo Esperanto”. La programon preparis kune Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj Muzeo de Sinjoro Tadeo.

Lidia Ligeża, la konata tradukistino kaj poetino, proksimigis al la publiko la vivon de Ludoviko Zamenhof kaj la tradukon de la epopeo fare de Antoni Grabowski. Ŝi ankaŭ rakontis pri la proceso de la laboro ĉe la plej nova eldono de la epopeo. Małgosia Komarnicka proksimigis al la publiko la historion de la 130 jaroj de la lingvo Esperanto, akcentante ĝiajn plej gravajn momentojn. Ŝi ankaŭ priskribis la vivon de Antoni Grabowski kaj lian penigan laboron kiel tradukisto de *Sinjoro Tadeo*, klarigante malfacilaĵojn, kiujn li devis venki.

Bela kaj unika akcento de la renkontiĝo estis aŭskultado de kelkaj fragmentoj de *Sinjoro Tadeo*, kiujn legis per brajlo pole Wojciech Ławnikowicz, la premiito de la 3a Vortbeleco en Esperanto en la konkurso de deklamata poezio (en sia aĝkategorio). Por komparo en la lingvo Esperanto la samajn fragmentojn legis Lidia Ligeża.

La librejo de la Muzeo de Sinjoro Tadeo estos la sola neesperantista loko, kie oni povos aĉeti la epopeon en la lingvo Esperanto. La epopeon oni eldonis dank’ al monsubteno de Universala Esperanto-Asocio.

La sekvan tagon Lidia kaj Małgosia estis invititaj viziti la muzeon kun ĉiĉerono. La Muzeo de Sinjoro Tadeo prezentas verkon de Mickiewicz en la ŝanĝiganta realeco de



historia kaj kultura Eŭropo, dum la lastaj 200 jaroj. Danke al la plej nova teknologio, kiu estas amika same al la juna kiel al la maljuna generacioj, en facile komprenebla kaj multaspekta maniero oni prezentas la kolektojn kaj transdonas la scion. Sur la 1500 m² de la ekspozicia areo, en 18 ĉambroj, oni kolektis 700 ekspoziciaĵojn, kaj instalis pli ol 100 ludojn, aplikaĵojn kaj plurrimedajn prezentojn. Vizitado de la muzeo estas vera plezuro.

Nia programo plenumis gravan rolon. Antaŭ ĉio ĝi elvokis interesigon de la publiko pri la lingvo Esperanto. Varsovia ĵurnalisto petis nin skribi artikolon pri nia renkontiĝo kaj pri la lingvo Esperanto [<http://czytelniczy.pl/pan-tadeusz-w-esperanto/>]. Muzeo de Sinjoro Tadeo, kune kun Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, preparos aŭtune sekvan renkontiĝon kaj ekspozicion, kiu estos ligita kun eldonoj de *Sinjoro Tadeo* en la lingvo Esperanto.

La organizantoj petas helpon sendi (pruntedoni aŭ donaci) la plej malnovajn ekzemplerojn de *Sinjoro Tadeo* en la lingvo Esperanto, aŭ informojn pri Antoni Grabowski, skribante al la retadreso informado.eo@gmail.com, aldonante en la temo de la informo “Sinjoro Tadeo”.

Nome de la estraro de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

Małgosia Komarnicka





La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie...

Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, permesas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti,

kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn.



Tiumaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, do ni ne malhelpu ĉi tiun agreblecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi prezentas ĉi-foje la ŝatatan kanton de la baritonisto Miroslav Smyčka, la honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

DORMU HO MIA PRINCET'

Vortoj: Friedrich Wilhelm GOTTER / Elgermanigis: Jiří KOŘINEK

Melodio: Bernhard FLIES





La proponon sendis Stano Marček, la ĉefredaktoro de „Juna Amiko”. Tiu kanto estas konata lulkanto “Dormu ho mia princet’” de Flies, kiun esperantigis Jiří Kořínek. Kial ĝi estas proponata – legu fine de la rubriko.



Dormu ho mia princet’


*Dormu ho mia princet’,
sonĝu en dolĉa kviet’,
pace dormetas la land’,
mutas en boskoj la kant’.
Kisas la luna radi’
vangon senkulpan al vi,
fermu sin via okul’-
dormu belsonĝe, karul’!
Baj lu, baj lu, baj lu, baj lu.*

*Ĉesis jam taga zorgpel’
dronas en pac’ la kastel’,
en koridora malbru’
viglas eĉ ne muso plu.
Tamen tra l’ nokta trankvil’
sonas angora suspir’,
kvazaŭ anima tortur’-
dormu belsonĝe, karul’!
Baj lu, baj lu, baj lu, baj lu.*

Publika premiero de la fama kanto okazis dum inaŭguro de la nova ekspozicio en la Esperanto-muzeo en Svitavy (Ĉeĥio) la 9-an de oktobro 2009 antaŭ la ĈEA-konferenco. Esperante kantis ĝin la profesia operkantisto kaj la honora ĈEA-membro, la baritonulo Miroslav Smyčka, kun akompano de Pavla Dvořáková per elektronika ĉembalo.

En la jaro 2017 ĉiuvespere inter la 17a kaj la 22a de decembro tiun belan lulkanton omaĝe al sia patro kantis la filino de Miroslav Smyčka Jolana Haan Smyčková, ĉeĥa kantistino, dublistino kaj aktorino de la fama praga teatro Semafor. Dum la kristnaska programo de la teatro Semafor la kantistoj kantis diverslingvajn kantojn, portante antaŭ si la flagon de la ŝtato, en kiu lingvo estis kantata la kanto. Jolana Haan Smyčková interalie kantis ĉi tiun lulkanton Esperante, portante la Esperantan flagon (surpodie kun la fondinto kaj la ĉefa famulo de la teatro Jiří Suchý).


Vi povas vidi kaj aŭdi ĝin ĉe <http://www.ipernity.com/doc/esperanto-muzeo-svitavy/46247018>



Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo!





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_esperto@mail.ru



Amo al teo kaj al Esperanto

Saluton, karaj legantoj!

Pasintnumere ni promesis daŭrigi pri la Internacia filmfestivalo de Ĉina Radio Internacia "Teo kaj Amo". Ĉi-numere ni rakontos pri unu el la gajnintoj de la unua festivalo, la filmo el Slovakio kaj Ĉeĥio "Rememoro". Ĝin produktis la teamo sub la gvido de Pavol Kaščák kaj Rostislav (Rosto) Čubok. Ili ambaŭ estas aktivuloj de la Esperanto-klubo Ostrava-Vítkovice.

Ostrava estas urbo en la orienta parto de Ĉeĥa Respubliko, apud la pola kaj la slovakaj landlimoj. Ĝi estas la administra centro de Moravia-Silezia regiono, la tria urbo laŭ sia grandeco en Ĉeĥio. La urbo havas riĉan historion kaj neordinaran arkitekturon.

Nur 6 km de la flughaveno de Ostrava situas la vilaĝo Bartošovice, kie en bela parko troviĝas impona kastelo kun la sama nomo. Ĝuste tie naskiĝis la filmo "Rememoro", kiu gajnis en la Unua Internacia Filmfestivalo "Teo kaj Amo".





Entute el Slovakio/Ĉeĥio estis senditaj al la Internacia filmfestivalo “Teo kaj Amo” du filmoj. “Rememoro” gajnis la unuan premion deflanke de la faka ĵurio – kaj en la publika interreta voĉdonado la 7-an lokon inter 45 filmoj el 20 landoj. La dua filmo – “Teeĵo de Bonaj Homoj” gajnis la trian premion kaj en la interreta voĉdonado la sesan lokon. Ambaŭ rezultoj estas tre valoraj kaj meritas sincerajn aplaŭdojn.

Kial “Rememoro”? La produktintoj jene klarigis la ĉefan ideon: la homoj ŝatas trinki teon. Kaj kutime ili faras tion nehaste, samtempe babilante kun parencoj, amikoj, aliaj proksimuloj. Kaj en tiuj konversacioj la teumantoj ofte kaj plezure rememoras siajn diversajn dumvivajn travivaĵojn. Kial ne rakonti pri ili, des pli, ke ili povas esti interesaj por aliaj homoj? Tiel naskiĝis la ĉefa enhava fadeno de la estonta filmo: teo estas amikeco kaj amo.


La aŭtoroj de la filmo havas diversajn profesiojn. Rostislav estas urba policisto kaj Pavol – sociala asistanto. Unuigas ilin amo al teo kaj al Esperanto. Pavol konatiĝis kun la internacia lingvo en sia infanaĝo. Foje li iris al la leciono pri violono kaj survoje

ekvidis en la montrofenestro lernolibron de Esperanto. Sur ĝi estis skribite “La internacia lingvo”. Tio ege allogis lin kaj li petis sian patrinon doni ok kronojn por aĉeti ĝin. Rostislav sciis pri Esperanto delonge. Tamen li komencis lerni ĝin pro tio, ke li iĝis organizanto de Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice.

Tio estas alia sukcesa projekto de la Esperanto-klubo Ostrava-Vitkovice kaj la ĉeĥa Esperanto-radio “Verda stacio”, kies redaktoro samtempe estas Pavol Kaščák.

La malnova “Verda stacio” havis longan historion. Ĝi estis fondita en la jaro 1933. En 1932 komencis elsendi prelegojn pri la tiama Ĉeĥoslovakio la radio en Brno – la dua urbo, laŭ sia grandeco, de la moderna Ĉeĥio. Sur ĝia bazo post unu jaro formiĝis “Verda stacio”. Ĝiaj kunlaborantoj lernis Esperanton en la kurso aranĝita de Radiojurnalo. La malnova “Verda stacio” elsendis artprogramojn kun deklamoj, kantoj, teatraĵoj, operoj, operetoj kaj muziko. La programoj estis altnivelaj pro aktorado de tiamaj eminentaj ĉeĥoslovakaj artistoj.

En 1950 “Verda stacio” finis sian multjaran sukcesan laboron. En la jaro





2011 estis fondita nova radio en Esperanto. Kaj rememore al tiu ĉi malnova profesia arta grupo (laŭ la historio de ĉeĥoslovaka esperantistaro – eksterordinara grupo de profesiaj artistoj) oni prenis ĝian nomon kaj restarigis novan “Verdan stacion” kun internacia membraro. Ĉiujn filmojn de Verda Stacio vi trovos en la youtube-kanalo *11pably*. Spektu kaj ĝuu ilin!

La unua Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice startis en la jaro 2012. Poste okazis sekvaj tri IEL – en la jaroj 2013, 2014 kaj 2015. La Lernejo okazas ĉiujare dum semajnofino en aŭtuno.

La teamo de la projekto estas internacia kaj konsistas el la vicvilaĝestro de Bartošovice Rostislav Čubok (Ĉĥio), la redaktoro de Verda Stacio Pavol Kaščák (Slovakio), la Esperanto-redaktoro kaj instruisto Stano Marček (Slovakio), la hungara kantistino kaj la redaktorino de la revuo *Heroldo de Esperanto* Anjo Amika kaj la iama estrarano de ILEI Magdaléna Fejfičová (Fejfi) el Slovakio.

Partopreni en la Internacia Esperanto-Lernejo rajtas iu ajn, kiu volas lerni la

Internacian lingvon. Inter la partoprenintoj estis ekzemple la plej juna UEA-membro el Aŭstrio, Samuel, kiu decidis partopreni en Bartošovice en 2014, ĝuste okaze de sia 14-a naskiĝtago. La organizantoj kaj aliaj partoprenantoj organizis por li belegan feston! Samuel poste gvidis la rubrikon *EKSTERE* en *Juna Amiko*!

En la programoj de IEL ĉeestas la kutimaj E-aranĝoj. Antaŭtagmeze okazas Esperanto-kursoj en du niveloj – por komencantoj kaj progresintoj. Gvidas ilin la spertaj Esperanto-instruistoj Stano Marček, Anjo Amika kaj Magdalena Fejfičová. Posttagmeze okazas varia kleriga kaj distra programo. La organizantoj proponas al siaj kursanoj aŭskulti diverstemajn prelegojn, spekti kaj pridiskuti sciigajn filmojn, sperti teo- kaj aliajn interesajn ceremoniojn. Vespere pasas tradiciaj renkontiĝaj aranĝoj: interkona kaj kulturriĉa nacia vespero, koncertoj, kantado, konversacioj kaj, certe, amika interkomunikado. Multajn programerojn oni okazigas ankaŭ por vasta ekstera publiko, kio sendube kontribuas al disvastigo de nia internacia lingvo.



Paŭlo Kaščák kaj Rostĥo Ĉubok (Verda Stacio) sur la kampoj de teo en Ĉinio.



La partoprenantoj konatiĝas kun la loka regiono kaj ĝiaj vidindaĵoj. La ekskursoj estas ĉiam bone kaj interese organizataj. Ekzemple, en 2014, samtempe kun la Internacia Esperanto-Lernejo, en la belaj ĉirkaŭaĵoj de Bartošovice pasis Fiŝkaptista Festivalo. La partoprenantoj de IEL ne nur gustumis bongustegajn lokajn fiŝojn, sed ankaŭ spektis diversajn regionajn tradiciojn. Jen vere interkultura sperto, ĉu? En 2015 la partoprenantoj vizitis savan stacion por bestoj en Bartošovice, kie ili eksciis pri la laŭdinda laboro de la savistoj. Jen estas ne nur kleriga, sed ankaŭ eduka valoro de Esperanto.

En la programo de la IEL ĉiam partoprenas lernantoj el la baza lernejo en Bartošovice. Por ili la vorto “Esperanto” jam estas sufiĉe konata. Ili speciale lernis la internacian lingvon por aktori en la filmo “Rememoro”. Vi povas imagi, kiom da ĝojo la infanoj spertis, kiam ili spektis sin mem (aŭ siajn

samlernejanon) sur la ekrano! Dum IEL la lernejoj kantas en Esperanto, prezentas programon al la partoprenantoj. Kaj tio tre plaĉas al ili. Krome, avantaĝo de tiu kunlaboro estas, ke la filmo (en Esperanto!) jam estis prezentita en ĉiuj klasoj de la lernejo. Do, ĉiuj lernejoj en Bartošovice konas la vorton “Esperanto”. Ni esperu, ke multaj el ili volos konatiĝi kun la internacia lingvo pli proksime.

En 2015, dum la 4-a Internacia Esperanto-Lernejo, Ĉeĥa Televido – studio Ostrava faris raporton pri la evento tra siaj kanaloj. Krome, la organizantoj faris videoregistraĵojn de ĉiuj IEL, kiujn eblas spekti en Interreto. La organizantoj esperas, ke danke al tio la kvanto de la partoprenantoj kreskos. Krome, dum la vojaĝo de la aŭtoroj de “Rememoro” al Ĉinio por la premia ceremonio, ili rakontis pri Internacia Esperanto-Lernejo kaj donis intervjuon pri ĝi en Ĉina Radio Internacia.






Danke al tio en IEL-2015 partoprenis ĉinaj gastoj. Interalie ili prezentis la antikvan ĉinan teo-ceremonion antaŭ la vasta – ne nur esperantista – publiko en Bartoŝovice. Do, vere “Teo kaj Amo” kaj Esperanto kiel ĝia laborlingvo unuigas homojn el diversaj mondopartoj. Lerne ĝin kaj partoprenu kaj gajnu en interesaj internaciaj kaj interkulturaj projektoj! Kaj, certe, partoprenu en la Internacia Esperanto-Lernejo en Bartoŝovice.

La sekva IEL okazos ĉi-jare somere tuj post la Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono, inter la 3-a kaj la 9-a de aŭgusto 2018. La programon vi trovos ĉi tie: <https://lernejo.weebly.com/>

Do, ni kore invitas vin al la 5-a IEL en Bartoŝovice. Bonvenon al la Internacia Esperanto-Lernejo en Bartoŝovice!

“Interkultura Mondo” esprimas koran dankon al la redaktoro de “Verda stacio” Pavol Kaščák pro la disponigitaj materialoj.



TEO KAJ AMO – Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy

Por esperantistoj en alia ĉeĥa urbo Svitavy estas konektiĝo de teo kaj amo la plej bela konstruaĵo en la urbo, Vilao de Ottendorfer, sidejo de Esperanto-Muzeo. Kial? Vidu: <https://www.youtube.com/watch?v=ShltWvCay8w>. Pliaj informoj kaj kalendaro okaze de la 10-a datreveno de la Esperanto-Muzeo elŝuteblas ĉe: <http://www.muzeum.esperanto.cz/>



Malstreĉiĝu kun *Juna Amiko*

Pico por la panjo...

Mi proponas al vi dediĉi iom da tempo por prepari bongustan picon kun la sepjara Julia. Julia finos junie infanejon kaj septembre komencos bazlernejon. Ŝi ŝatas kanti, danci, pentri kaj de kiam ŝi ekkonis literojn, ŝi ŝatas ankaŭ legi. Julia krome ŝatas prepari surprizojn por la tuta familio.

En Pollando la 26-an de majo oni celebras la Tagon de Patrino kaj Julia tiun tagon, kun helpo de sia patro, preparas donace ŝatatan picon por sia panjo.

Nun speciale por ni ŝi malkaŝos sian recepton.

Preparu:

300 g da faruno (speciala por pico),
ĉ. 2/3 glaso da akvo (160 ml), 25 g da
freŝa gisto, 2 kuleroj da olivoj, 1 kulero da
sukero, salo.

Faru:

En trinkpoteto kunmiksi giston kun sukero, aldonu duonon da akvo kaj miksu. Flankenmetu ĝin por 10 minutoj, ĝis la pasto komencos “labori”. Tio estos “fermentaĵo”.

Al bovlo enŝutu la farunon, salon, olivojn, la restan akvon kaj la fermentaĵon.

Kunmiksi la konsistigaĵojn kaj sekve ĵetu la paston sur la tabulon. Knedu ĉirkaŭ 10 minutojn, ĝis la pasto estos elasta kaj glata.

Formu bulon kaj ĵetu ĝin en la bovlon. Kovru ĝin per kuirviŝtuko kaj lasu unu horon en varma loko, ĝis la pasto duobligos sian amplekson.


Dum tiu tempo preparu ingrediencojn, kiujn vi enmetos en la picon.

Post unu horo transmetu la paston el la bovlo sur la tabulon, knedu, formu flanon, ruletendu ĝin kaj poste transportu ĝin en la bakpleton.

Nun sur la paston enmetu tomatan saŭcon kaj montru la riĉecon de viaj talentoj kaj de imagkapabloj, ornamente la picon.

Uzu do kolbason, ŝinkon, salamon, cepon, tranĉitajn tomatojn, maizon,





fungojn, diversajn specojn de fromaĝo kaj multajn aliajn aldonadojn. Baku 12-15 minutojn (dependas de la uzitaj ingrediencoj) en temperaturo de 250 gradoj.

Memoru, ke prepari picon vi rajtas nur kun helpo de plenkreskuloj, se vi ankoraŭ estas infano.

Julia promesis alian fojon prepari speciale por la legantoj de *Juna Amiko* frandaĵojn "Trufoj de Bongosia".

Pico estas sud-italdevena bakaĵo. Ĝia bazo konsistas el faruno, akvo, salo kaj gisto. Sur ĝin oni kutime metas tomatan saŭcon, kolbason, fromaĝon kaj oni spicas ĝin per bazilio.

La plej konata, simpla pico-speco estas pico, kiu nomiĝas Margherita (margarita) kaj kiu prezentas la kolorojn de la itala flago.

Laŭ legendo, en la jaro 1889, la pico kun verda bazilio, blanka fromaĝo kaj ruĝaj tomatoj, estis nomita Margherita, laŭ la nomo de la reĝino Margerita de Savojo (Margherita Maria Teresa Giovanna

aŭ en Esperanto Margareto), la edzino de la itala reĝo Umberto la 1-a. La tiama bakisto Raffaele Esposito, plenumante deziron de la reĝino, preparis la plej simplan manĝaĵon de Napolo (itale Napoli) kaj ĝi tiel bongustis al la reĝino, ke tiu plej simpla kaj la plej malmultekosta manĝaĵo ricevis veran reĝan nomon.

Malstreĉiĝu: Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj ŝatokupoj kun priskribo, ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblecon ekkoni ilin. Małgosia Komarnicka





Luiza Carol:

Voĉlegitaj fabeloj

Pri “Fabeloj” de Hans Christian Andersen, tradukitaj de L.L. Zamenhof kaj voĉlegitaj de Stano Marĉek. Sur 16 kompaktaj diskoj aŭ 2 DVD-diskoj. Suma daŭro: 16 horoj kaj 44 minutoj.

Jen bona novaĵo: vi povas aŭskulti fabelojn de H.C. Andersen en Esperanto sen peti iun ajn voĉlegi ilin por vi!

Stano Marĉek voĉlegis ilin belege kaj registris ilin sur lumdiskojn! Viaj gepatroj aŭ geavoj povas laciĝi, voĉlegante por vi ree kaj ree, sed la lumdiskoj neniam laciĝas!

Cetere, vi povus ĝui la aŭskultadon eĉ se vi jam scipovas legi. Verdire, ankaŭ viaj gepatroj kaj geavoj povus ĝui la aŭskultadon, ĉar temas pri arteca legado. La aŭskultado de belaj tekstoj, legataj kun la ĝusta prononco, estas bonega ekzerco por plibonigi vian komprenkapablon en Esperanto. Kaj se vi tamen deziras havi antaŭ la okuloj la tekstojn, vi povas trovi ilin en la reto senprobleme.

Verŝajne vi jam aŭskultis aŭ legis multajn el tiuj fabeloj en via denaska lingvo. La aŭtoro verkis ilin en la dana, kaj poste oni tradukis ilin en pli ol 125 lingvojn. En Esperanton tradukis ilin L. L. Zamenhof, la

kreinto kaj iniciatinto de Esperanto. Kun grandega plezuro mi aŭskultis la lumdiskojn. Mi provis imagi, kiel mi agus aŭ kiel mi sentus, se mi estus unu aŭ alia el la protagonistoj de tiuj fabeloj.

Ekzemple, kion mi farus, se mi estus la “malbela anasido” kiu fin-fine malkovris, ke ĝi iĝis belega cigno? Verŝajne mi ekamus ĉiujn birdidojn. Mi rakontus al ili mian malgajan historion, por ke ĉiuj idoj lernu respekti bonkorecon, pli ol belecon.


Kiel mi agus, se mi estus la “virineto de maro”? Ho, mi certe lernus skribi kaj skribus al la princo longan kortuŝan leteron, klarigante al li tion, kio vere okazis.

Se mi estus Elinjo-Fingreto, mi sopirus pri la bona virino el kies floro mi ekaperis en la mondo. Mi supozus, ke ŝi estas tre trista pro mia malapero. Verŝajne mi decidus viziti ŝin kune kun mia edzo, por ke ŝi ĝoju pri mia bonŝanco.

Ĉu ankaŭ vi ŝatas imagi vin mem kiel protagonistojn de la fabeloj kiujn vi aŭskultas?

Kion vi imagas pri vi mem, en la cirkonstancoj de la fabeloj?

(Pli pri la diskoj: www.espo.link/stano)





Mireille Grosjean

La najtingalo

En nia revuo *Juna Amiko*, en la tria numero de la jaro 2013, ni aperigis tekston *Efiko de Amikeco*, kiu rilatis al la dana poeto kaj fabelisto Hans-Christian Andersen.

Nun venas parteto el la libro de C. Heilskov: *Hans-Christian Andersen, liaj vivo kaj verkoj*.

Tre ofte la fabeloj komenciĝas en alparola maniero, kvazaŭ la aŭtoro sidus en rondo da infanoj. Kiel ekzemplon oni povas preni la komencon de *La Najtingalo*: “En Ĉinujo, vi ja scias, la imperiestro estas ĉino, kaj ĉiuj, kiujn li havas ĉirkaŭ si, estas ĉinoj. De post la tempo, pri kiu mi rakontos al vi, pasis jam multe da jaroj, sed ĝuste tial valoras aŭskulti la historion, ĉar alie oni povus ĝin forgesi. La palaco de la imperiestro estis la plej pompa en la mondo, tute kaj plene el delikata porcelano, tiom multekosta, sed tiom rompebla, tiom malfacile tuŝebla, ke oni ĝuste devis sin gardi. En la ĝardeno oni vidis la plej mirindajn florojn, kaj al la plej belaj el ili estis alligitaj arĝentaj sonoriloj, kiuj senĉese sonoradis, por ke oni ne povu preteriri, ne rimarkante la florojn. Jes, ĉio estis tiom elpensita en la ĝardeno de la imperiestro, kaj ĝi etendiĝis tiom longe, ke la ĝardenisto mem ne sciis la finon de ĝi; se oni daŭrigas la iradon, oni venos en la plej ĉarman arbaron kun altaj arboj kaj profundaj lagoj. La arbaro etendiĝis tute ĝis la maro, kiu estas blua kaj profunda; grandaj ŝipoj povis veturi ĝis sub la branĉoj, kaj en ili loĝis najtingalo, kiu kantis tiom benate, ke eĉ la malriĉa fiŝkaptisto, kiu havis tiom multe da alio prizorgi, kuŝis trankvile kaj aŭskultis, kiam

li dum la nokto estis ekstere por suprentiri la fiŝreton kaj tiam aŭdis la najtingalon. “Sinjor’ Dio, kiom bele estas!”, li diris, sed tiam li devis prizorgi siajn aferojn kaj forgesis la birdon; tamen la proksiman nokton, kiam ĝi denove kantis, kaj la fiŝkaptisto venis tien, tiam li diris same: “Sinjor’ Dio, kiom do estas bele!”

De ĉiuj landoj de la mondo venis vojaĝantoj al la urbo de la impriestro, kaj ili admiris ĝin, la palacon kaj la ĝardenon, sed aŭdinte la najtingalon ili ĉiuj diris: “Ĝi tamen estas la plej bona!”

Kaj la vojaĝantoj veninte hejmen rakontis pri la urbo, la palaco kaj la ĝardeno, sed la najtingalon ili ne forgesis, ĝi estis plej supren metata, kaj tiuj, kiuj povis fari versojn, skribis la plej belegajn poemojn, ĉiujn pri la najtingalo en la arbaro ĉe la profunda lago.

Tiuj libroj venis dise en la mondon, kaj kelkaj do ankaŭ iam venis al la imperiestro. Li sidis sur sia orseĝo, legis kaj legis, ĉiun momenton li kapsignis, ĉar li ĝojigis legante la grandiozajn priskribojn de la urbo, de la palaco kaj de la ĝardeno. “Sed la najtingalo tamen estas la plej bona!”, staris skribite.

“Kio!” – diris la imperiestro, “la najtingalo! Ĝin mi ja tute ne konas! Ĉu estas tia birdo en mia imperio, eĉ en mia ĝardeno! Tion mi neniam aŭdis! Ion tian oni devas sperti legante!”

Kaj tiam li alvokis sian kavaliron, kiu estis tiom altranga, ke se iu, kiu estas pli simpla ol li, kuraĝis paroli al li, aŭ demandi





pri io, tiam li ne respondis pli ol "Pl!" kaj tio signifas nenion.

"Laŭdire ja estas ĉi tie treege mirinda birdo, kiu nomiĝas najtingalo!" – diris la imperiestro, "oni diras, ke ĝi estas super ĉio en mia granda regno! Kial oni neniam estas dirinta ion pri ĝi al mi?" "Mi neniam aŭdis ĝian nomon!" – diris la kavaliro, "ĝi neniam estis prezentita ĉe la kortego."

Kaj jen la sekvo el la verko de Andersen:

"Mi ordonas, ke ĝi hodiaŭ vespere venu ĉi tien kaj kantu antaŭ mi!" – diris plue la impriestro; "la tuta mondo scias, kion mi havas, kaj mi ĝin ne scias." Ĉiuj membroj de la kortego esploras ĉie pri la bele kantanta birdo.

La kortegestro, la kavaliro, asertis: "Via imperiestra moŝto tute ne povas prezenti al si, kiaj diversaj mensogoj estas verkitaj. Ĉio ĉi tio estas fantazioj kaj apartenas al la tiel nomata nigra magio!"

"Sed la libro, en kiu mi tion ĉi legis" – respondis la imperiestro, "estas sendita al mi de la altepotenca imperiestro de Japanujo, kaj sekve ĝi ne povas esti malveraĵo. Mi volas aŭdi la najtingalon! Ĝi nepre devas esti hodiaŭ vespere ĉi tie! Ĝi havas mian plejmoŝtan favoron! Kaj se ĝi ne venos, tiam mi ordonos piedpremi la ventrojn de ĉiuj korteganoj tuj post ilia vespermanĝo!"

(..) Fine ili trovis malgrandan, malriĉan kuirejan knabineton. Ŝi diris: "Ho Dio, la najtingalo! Mi bone ĝin konas! Jes, kiel bonege ĝi kantas! Ĉiuvespere oni permesas al mi forporti por mia bedaŭrinda malsana patrino kelkajn restaĵojn da manĝaĵoj; ŝi loĝas malsupre apud la bordo de la maro; kaj kiam mi iras returne, estas laca kaj ripozas en la arbaro, tiam mi aŭdas la najtingalon. Tiam larmoj staras en miaj okuloj kaj mi havas la senton kvazaŭ mi kisis mian patrino!"

"Malgranda kuireja knabineto!" – diris la kortegestro, "ni havigos al vi konstantan oficon en la kuirejo kaj permeson vidadi, kiel la imperiestro manĝas, se vi povas konduki nin al la najtingalo, ĉar estas

ordonite, ke ĝi hodiaŭ vespere venu por kanti!"

Korteganoj akompanis la knabinon al la arbaro.

"Jen ĝi estas!" – ekkriis la knabineto; "aŭskultu, aŭskultu, kaj jen tie ĝi sidas!" – kaj ŝi montris en la direkto al malgranda griza birdo supre en la branĉoj.

"Ĉu ĝi estas ebla!" – diris la kortegestro, "tia mi neniam ĝin prezentus al mi! Kian simplan eksterajon ĝi havas! Ĝi certe paliĝis pro tio, ke ĝi vidas ĉirkaŭ si tiom multe da altrangaj personoj!"

"Najtingaleto!" – ekkriis la kuireja knabineto tute laŭte, "nia plejmoŝta kaj plej favorkora imperiestro deziras, ke vi kantu antaŭ li!"

"Kun la plej granda plezuro!" – respondis la najtingalo, kaj ĝi ekkantis tiel, ke estis plej agrabla ĝuo ĝin aŭdi.

Vespere la birdo aperis en la bele ornamita salono de la kortego.

Meze en la salono, en kiu sidis la imperiestro, estis starigita malgranda ora kolono, sur kiu devis sidi la najtingalo. La tuta kortegano tie estis kolektita, kaj la kuireja knabineto ricevis la permeson stari malantaŭ la pordo, ĉar nun estis jam donita al ŝi la titolo de efektiva kortega kuiristino. Ĉiuj havis sur si siajn festajn vestojn, kaj ĉiuj rigardadis la malgrandan grizan birdeton, al kiu la imperiestro faradis aprobajn kapmovojn.

La najtingalo kantis tiel ĉarme, ke ĉe la imperiestro aperis larmoj en la okuloj; la larmoj fluis malsupren sur liaj vangoj kaj tiam la najtingalo kantis ankoraŭ pli bele, kaj ĝia kantado iris profunde en la koron. La imperiestro estis tiel ĝoja kaj kontenta, ke li bonvolis decidi, ke la najtingalo portu oran rubandon ĉirkaŭ la kolo. Sed la najtingalo dankis, dirante, ke ĝi ricevis jam sufiĉan rekompencan.

"Mi vidis larmojn en la okuloj de la imperiestro; tio estas por mi la plej granda trezoro! La larmoj de imperiestro havas mirindan potencon! Dio scias, ke mi estas sufiĉe rekompencita!"





Unu tagon oni alportis al la imperiestro grandan keston, sur kiu estis skribite: “Najtingalo!”.

(..) Ĝi estis malgranda artaĵa objekto, kiu kuŝis en skatolo, artefarita najtingalo, kiu estis kvazaŭ simila al la viva, sed ĉe ĉiuj flankoj estis garnita per diamantoj, rubenoj kaj safiroj. Se oni streĉtordis la artefaritan birdon, ĝi povis kanti unu el la pecoj, kiujn kantis la efektiva najtingalo, kaj samtempe ĝi movadis la voston supren kaj malsupren kaj brilis de arĝento kaj oro. Ĉirkaŭ la kolo ĝi portis rubandeton, sur kiu estis skribite: “La najtingalo de la imperiestro de Japanujo estas senvalora en komparo kun la najtingalo de la imperiestro de Ĉinujo!” “Belege!” – ili ĉiuj diris, kaj tiu, kiu alportis la artefaritan birdon, ricevis tuj la titolon de la imperiestra ĉefa kortega alportisto de najtingaloj.

Tiu kortegano kantigis la aŭtomaton tridekfoje, kaj, kiam oni volis kompari tiun ĉiam saman kanton kun la kantado de la vera birdo, tiu ĉi estis malaperinta.

La efektiva najtingalo estis ekzilita el la lando kaj regno.

La artefarita birdo havis sian lokon sur silka kuseno, senpere apud la lito de la imperiestro. Ĉiuj donacoj, kiujn ĝi ricevis, oro kaj juveloj, kuŝis ĉirkaŭ ĝi, kaj pri la titolo ĝi jam atingis la altecon de grandimperiestra noktotabla kantisto kun la rango de konsilisto de la unua klaso de la maldekstra flanko.

Sed unu vesperon, kiam la artefarita birdo ĝuste kantis plej bone kaj la imperiestro kuŝis en la lito kaj aŭskultis, el la interno de la birdo aŭdiĝis: “ŝŝŝup!”. Io krevis: “ŝurrr!” Ĉiuj radoj ekkuris, kaj baldaŭ la muziko silentiĝis.

Post tiu paneo la imperiestro malsaniĝis grave. Vidante tion la vera najtingalo revenis al la

ĉambro de la kuŝanta moŝto kaj kantis denove. “Mi dankas, mi dankas!” – diris la imperiestro; “vi, ĉiela birdeto, mi bone vin konas! Vin mi ekzilis el mia lando kaj regno, kaj tamen vi forkantis de mia lito la malbonojn, vi forpelis la morton de mia koro! Kiel mi povas vin rekompenzi?”

“Vi min rekompenzis!” – diris la najtingalo; “larmojn elverŝis viaj okuloj, kiam mi la unuan fojon kantis antaŭ vi; tion mi neniam forgesos al vi, tio estas la juveloj, kiuj estas agrablaj en la koro de kantanto. Sed dormu nun, fariĝu freŝa kaj sana! Mi kantos kaj endormigos vin.”

(..) “Por ĉiam vi devas resti ĉe mi!” – diris la imperiestro; “vi kantos nur tiam, kiam vi volos, kaj la artefaritan birdon mi disbatos je mil pecoj!”

“Ne faru tion!” – diris la najtingalo; “la bonon, kiun ĝi povis fari, ĝi ja faris; konservu ĝin, kiel antaŭe! Mi ne povas loĝi en kastelo, sed permesu al mi venadi, kiam mi mem havos la deziron. Tiam mi vespere sidos tie sur la branĉo apud la fenestro, kaj mi kantos al vi, por ke vi fariĝu gaja, sed samtempe ankaŭ meditema. Mi kantos pri la feliĉuloj kaj pri tiuj, kiuj suferas; mi kantos pri la bono kaj malbono kiu estas kaŝata antaŭ vi. La malgranda birdeto flugas malproksime, al la malriĉa fiŝkaptisto, al la tegmento de la kampulo, al ĉiu, kiu estas malproksima de vi kaj de via kortego. Vian koron mi amas pli ol vian kronon, kaj tamen la krono havas en si ion de la odoro de sankteco.

Mi venados, mi kantados al vi!”

Mirejo komentas: dum sia restado en Le Locle, Svislando, Andersen povis admiri ne nur la horloĝojn tie fabrikatajn, sed ankaŭ la diversajn aŭtomatojn kaj muzikskatolojn tipajn de tiu ĵurasa regiono. Tutcerte tiuj iloj inspiris lin por la verkado de “La najtingalo”.





Jose de Jesus Campos Pacheco

Elefantoj

Elefantoj apartenas al la mamula grupo nomata elefantedoj aŭ rostruloj. La rostro vere estas longa nazo, kiun la posedanto uzas por spiri, nutri sin, trinki, teni ion kaj por surŝpruci sin.



Afrika elefanto

ĝis preskaŭ unu hektolitro. Ili nutras sin per folioj, herboj, arboŝeloj, fruktoj kaj salo. Kutime ili estas pacemaj kaj atakas nur por defendi idojn aŭ kiam ili estas timigitaj aŭ vunditaj. Inaj bestoj kutime kondukas al sekureco kaj virbestoj agas kiel postgvardio.

Elefantoj estas beboj ĝis ses jaroj, gejunuloj ĝis dek kvin jaroj. Poste elefantoj povas patriĝi aŭ patriniĝi. Maljunuloj havas sepdek jarojn, kiam aperas sulkoj en la haŭto. Poste sekvas la morto.

La plej bone konata labor-elefanto estas la hinda aŭ azia elefanto, kiu troviĝas en Hindio (Barato), Birmo, Tajlando kaj Malajzio. Jam delonge la elefanto famiĝis en la servo de homoj kaj ili amuzas nin en cirkaj spektakloj.

La afrika kaj la hinda (azia) elefantoj malsame aspektas. La afrika havas grandajn orelojn kaj kurban frunton. La hinda havas malgrandajn orelojn kaj kvadratan frunton.



Hinda, iom ŝminkita elefanto

La dentegoj de elefantoj estas kurbaj tranĉdentoj, kiuj kreskas el la supra makzelo. La rekorda pezo de unu tia dentego estas 54,40 kilogramoj.

La plej granda surtera mamulo en la mondo estas la afrika elefanto, kies mezuro, je la ŝultroj, povas atingi 3,30 metrojn kaj pezo ĝis 1000 kilogramoj. Ĝi vivas en plenaeraj parklandoj de Tropika Orienta Afriko. Aroj konsistantaj el vir- kaj in-bestoj kaj iliaj idoj vagadas, serĉante nutraĵojn. Plenkreskuloj povas manĝi ĝis 270 kg en unu tago kaj trinki akvon



Hinda elefanto kun ido




Azia elefanto kun domo sur la dorso



Vetera krucenigmo

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



1	2	3		4	5	
6				7		8
9			10			
		11				
12	13					
14			15		16	
17						

HORIZONTALE:

- Vetero kun bruego, kiu sekvas subitan lumegon, estas tia. "Ni ne iru morgaŭ per velŝipeto, se estos _____ vetero." (6)
- La longo oble la alto estas la _____o. (3 R)
- Granda kornhava besto en nordameriko, simila al boaco. (3 R)
- Honŝuo estas la plej granda _____ insulo. (7)
- Planto, kiu kreskas sur la tero en marĉaj regionoj. (5 R)
- Por tranĉi panon vi _____ tranĉilon. (3)
- En kristanismo oni konsideras la _____ dek tri malbonŝanca. (7)
- Oni ŝirmas sin de pluvo per _____ . (7)

VERTIKALE:

- Azia uragano. La signifo en la japana estas "granda vento". (7)
- Por la olimpika ĉampiono en la unua loko estas la _____ medalo. (3)
- Antaŭ centoj da jaroj homoj malsaniĝis pro danĝera peza metalo (kemia simbolo Pb) en la tuboj, kiuj kondukis akvon inter la domoj. Nuntempe, la tuboj estas _____aj. (2-5 R)
- Kun malkontento kaj spleno. (7).

- "Ĉesu fumi ĉi tie, _____ la polico monpunos vin!" (4)
- Granda peza pafilo, uzita sur velŝipoj en malnovaj tempoj. (6)
- Artefarita Inteligento (mallongigo 2)
- Sono de abelo (3 R)
- Peceto, fragmento. (sufikso 2)
- Elefanto estas pli granda _____ muso. (2)

Solve el la antaŭa numero

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
A	L	I	D	I	S	D	O	N	I	S		
B	B	A	R	O	N	O	O	P	E	R	O	J
C	A	N	I	M	A	L	A	O	P	O	N	U
Ĉ	T	U	S	O	V	I	V	A	A	N	U	S
D	I	G	O	L	I	B	E	R	A	I	S	T
E	M	O	M	I	Z	E	R	E	C	O	E	A
F	O	R	E	A	O	R	T	O	J	A	N	Ĉ
G	R	A	M	O	S	T	A	L	S	K	I	I
Ĝ	A	D	O	R	I	A	S	E	K	U	R	O
H	V	I	R	T	O	J	S	K	I	Z	O	N
Ĥ	K	I	O	N	E	E	S	T	I	S		



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; info@esperanto.org.au. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; aon.913548977@aon.at. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; financoj@fel.esperanto.be. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; belabutiko@esperanto.org.br. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; eab@esperanto.org.uk. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; mrvp@interpre.org; ilei@espereto.com. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; polnickypavel@seznam.cz; cea.polnický@quick.cz. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; strigo@esperanto.cl. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; arko.gong@qq.com. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; arnecasper@yahoo.com. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; ahto.siimson@esperanto.ee. **Finnlando:** Sylvia Hämäläinen, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; sylvia.h@kolumbus.fi. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; esperanto-france@esperanto.org.net. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; wolfgang.schwanzer@esperanto.de. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; zsofia.korody@esperanto.de. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; simio_2004@yahoo.es. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; esperanto@isl.is. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; saviogp@netvision.net.il; esperantisto@live.com. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; silkovojo@aliceposta.it. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; esperanto@jei.or.jp. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; marija@hes-keu.hr. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; irenaa@takas.lt. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; akbondhus@jkn.no. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; gddewar@ihug.co.nz. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; mtatara@gmail.com. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; asocio@esperanto.pt. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; sezonoj@mail.ru. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; zciric2@gmail.com. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; petro@ikso.net. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B Igh 1303, SE-931 38 Skellefteå; leif.holmlund@telia.com. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; ch_scheidegger@bluwin.ch. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; rezamenhof@yahoo.com. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; esp.togo@cafe.tg. **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; usa@esperanto-usa.org. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; uea@uea.org. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** ilei.officejo@gmail.com.

Jario

Jario kaj Anaja prizorgas la semadon pri jukao en la palisaro de Kuejbo.

